## EL LA FAKOJ

### Sciigoj de la Terminologia Centro de I. S. A. E.

### (ISAE-TC-126)

(La fakoj estas envicigitaj laŭ UDK. De nun ni uzos la simbolojn por lingvoj denove laŭ la esperantaj nomoj, do: A angla, F franca, G germana, H hispana, I itala ktp).

54 : 661 **Kemio. Kemia Tekniko.** — Necesas atentigi pri la ega valoro de la unua esperantlingva fakrevuo KEMIO INTERNACIA eldonita de Urugvaja Esperanto-Societo kaj regule aperanta ekde 1965. Nun jam komencis la kvara jarkolekto — aperas dum jaro tri numeroj po ĉ. 80 paĝoj de la formato 16,5 × 22,0 cm. La revuo ne pritraktas terminologiajn demandojn, sed publikigas nur seriozajn fakajn artikolojn. Ni solvas la terminologiajn demandojn laŭ la bezono prezentiĝanta en la artikoloj mem. Sed el tiuj artikoloj oni povas ĉerpi multe da praktikaj solvoj, kiujn finfine decidas ja la uzo. Ĉar granda parto de tiuj artikoloj tuŝas ĝenerale teknikajn fakojn (konstruadon de aparatoj ktp.), la revuo devas esti ne nur interesa por kemiistoj. La Terminologia Centro pro tio rekomendas al ĉiuj kunlaborantoj teknikaj, ke ili ankaŭ subtenu la revuon, ĉu abonante ĝin ili mem, ĉu abonigante ĝin fare de gravaj entreprenoj aŭ sciencaj bibliotekoj, universitatoj ktp. Mendu la revuon ĉe Urugvaja Esp. - Societo, Casilla de Correo 1040, Montevideo Urugvajo!

55 **Geologio.** — D-ro E. Dudich jr., Karolyi M. u. 14/b, Budapest V, Hungarujo, informis nin, ke la preparado de GEOLOGIA TERMINARO (deklingva), entreprenita en kunlaboro kun siaj kolegoj Mabesoone, Gérard kaj Kavka, estas daŭrigota je pli favoraj cirkonstancoj. Nome li forlasis sian ĝisnunan postenon kiel estro de la centra laboratorio de la hungara Entrepreno por Baŭksitserĉado en Balatonalmádi kaj nun laboras en la ŝtata Geologia Instituto (adreso: Budapest XIV., Népstadion út 14). Oni komisiis lin, organizi landan Geologian Informan Servon.



55 : 930.26 **Geologio. Arkeologio.** — Resumoj en Eo pri geologiaj artikoloj aperas fine de ĉiu numero de la hispanlingva fakrevuo PUIG CASTELLAR, Boletin de la Sección de Estudios del CANTRO EXCURSIONISTA, San José, 20 Santa Coloma de Gramanet, Hispanujo. (Numerojn de la revuo disponigis al T. C. s-ro Petro Nuez, Muntaner, 416, lo, Barcelono 6, Hispanio.)

62 **Tekniko ĝenerala. Inĝenieraĵoj.** — En la ofset -presejo »Esperanto Press« de Rüdiger Eichholz (Kanado) aperis fine de 1967 TECHNISCHES WÖRTERBUCH DEUTSCH-ESPERANTO de dipl. inĝ. Rudolf Haferkorn. Broŝurita; 11,5 × 16,0 cm; 84 paĝoj. La libreto reprezantas reproduktaĵon de la teknika vortaro aperinta 1962/67 en GER, kun abundaj korektoj kaj aldonoj, kiun la uzanto devas englui sube sur la respektivaj paĝoj, kaj kun aparta alfabeta listo de tiuj esperantaj radikoj (kun difinoj!) mankantaj aŭ alimaniere difinitaj en Plena Vortaro kaj ĝia Suplemento. Tion tre lerte aranĝis la eldonisto Rüdiger Eichholz, ĉe kiu estas mendebla la vortaro (adreso: R. Eichholz, Esperanto Press, 2427, Padstow Cres., Clarkson, Ont., Kanado.).

621.382 **Elektronikaj aŭtomatoj. Komputeroj.** — »OPERACIADO-FAKA TERMINARETO« G-A-F nun estas preparata de D-ro G. Kalckhoff, delegito de ISAE por okc. Germanujo, direktoro de la Siemens-Kalkulcentro en Munkeno, en kunlaboro kun pluraj diversnaciaj kompetentuloj pri elektronikaj aŭtomatoj (komputeroj). Kontribuaĵojn oni sendu senpere al D-ro G. K., Schuckertstr. 14/XI, 8 München 25, Germanujo (BRD).

621.9 **Il-maŝinoj.** — S-ro Edward M. Rosher, famkonata verkisto en la teknika nomenklaturo, eldonis en januaro 1968 IL-MAŜINAn NOMENKLATURОn en 6 lingvoj, nome Eo-A-F-G-H-I. Propra eldono hektografe multobligita; 4 tabuloj; 25 × 40 cm, faldebla al 20 × 25 cm; 82 artikoloj. La verko nur celas doni nomojn esperantajn al la maŝinoj enlistigitaj en la nacilingvaj kolonoj. La aŭtoro, kiu nun estas 92-jarulo kaj faris valoregan leksikonan laboron dum preskaŭ 50 jaroj, menciis en la antraŭparolo, ke ĉi tiu devas esti lia finlaboraĵo en Eo en la teknika kampo, pro lia malpliboniĝanta vidpovo. ISAE deziras al la meritplena membro ĉion bonan en lia vivovespero.

654; 656; 621.39 **Poŝto kaj Telekomuniko.** — Ekde 1967 aperadas denove fakrevuo de la poŝtistoj kaj telekomunikistoj, nome »Heroldo PTT«, Bulteno de Internacia Poŝtista kaj Telekomunikista

Esperanta Asocio — Sofia, Bulgario, (adreso: Sofio, Poŝtenska kutija 25, IPEA). Ĝojiga fakto estas, ke en ĝi jam aperis konsiderindaj kontribuaĵoj al la telekomunikteknika terminaro. Perantoj por la revuo jam troviĝas en pluraj eŭropaj landoj.

661 **Kemiaj produktoj. Kemia Tekniko.** — S-ro Bruno Vogelmann, estro de Chemische Fabrik Bruno Vogelmann en 718 Crailsheim (Württemberg), Poŝtkesto 440, Okc. Germanujo, komencis aldoni en la uzad-instrukcioj por siaj kemiaj produktoj kaj en varbprospektoj apud la germana kaj eventuale angla ankaŭ tekston en Esperanto. Li donis valoran kontribuaĵojn al la Esp. — fakrevuo »KEMIO INTERNACIA«; interalie li tie aperigis artikolon »Hardilo por cemento«, en kiu li pritraktas la konsistecon kaj efikon de la produkto »Tironal-Dur« servanta por fortikigi betonon.

R. Haferkorn


**Haveblaj malnovaj kolektoj de SCIENCA REVUO**

Respondante al plurfoja interesiĝo de niaj membroj ni povas respondi ke

**Vol. 13, 14, 15 kaj 16 de Scienca Revuo**

estas haveblaj laŭ la malplialtigita prezo:

**por la membroj de ISAE 15 steloj, por aliaj 20 steloj**

La antaŭajn volumojn de la revuo ni bedaŭrinde ne povas liveri, pro la nekomprenemo de la antaŭa eldonisto.

**Vol. 17 estas havebla laŭ la normala abonprezo**

(25 steloj por la membroj de ISAE, 30 steloj por aliaj)

**Ne forgesu ke ankaŭ SCIENCAJ STUDOJ estas ankoraŭ haveblaj**

(laŭ la malnova prezo de nur 50 steloj)

La pagojn faru plej bone pere de la delegita reto de ISAE.

(La kurzoj: 1 pundo = 35 st., 1 dol. = 14 st., 1 NF = 3 st., = 2,5 din.)